

Leterkesto 8.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 1990-013-A-3

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo90-013/SRI-1990-013-A-3-Claude-GACOND-Leterkesto-VIII.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Kiel ni diris en la pasintaj elsendoj malfermante nian leterkeston, alvenis mesaĝoj el 36 landoj de 166 aŭskultantoj. Al tiuj skribintoj ni respondas laŭ la alfabeto de ilia familia nomo.

Ni salutas Jan MOGIELNICKI en Katowice (Pollando), Marilou MÜNGER en Fleurier (Svislando), kiu skribis okaze de la 3-a Kultura Kristana Semajno Esperantista disvolviĝinta ĉe Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds. Inter la kunsubskribintoj ni legas la nomojn de fratulino Theotima, Agathe SCHUMANN, Bernhard EICHKORN, Jozefo kaj Irene WOZNICZKA, Leen kaj Sietske HORDIJK, Grete BURKHARDT, Luise Möhl, Ursula TRABER, Margareta GRIMM kaj A. BURKHARDT, prezidanto de KELI. La 4-a Kultura Kristana Semajno Esperantista okazos ree en La Chaux-de-Fonds ĉe Kultura Centro Esperantista de la 8-a ĝis la 13-a de oktobro. István NAGY en Budapeŝto (Hungario) skribis:

A.- "Mia silento ne estas indiferenteco. Tre bone aŭskulteblas ĉiuj disaŭdigoj. Plurajn intervjuojn, prelegojn mi surbendigis. Ekz. kun ERTL. Estis interesaj la prilingvaj prelegoj, pri la instrumentodiko, Corbusier, TEJO-kongreso. Do mi estas fidela aŭskultanto.

Cl.- Niaj fidelegaj geaŭdantoj Bruno NAJBARO kaj lia edzino en Keighley (Britio) aŭskultis kun granda intereso la elsendojn pri la voĉdono kontraŭ la armeo okazinta en Svislando. La naturamika movado sendis al ni informojn pri la 23-a Internacia Renkontiĝo Naturamika, kiu okazos en la ripozloko Abaliget (Hungario) de la 7-a ĝis la 14-a de julio. El la riĉa anoncita programo ni menciis la ĉi-sekvajn punktojn: gimnastikado, naĝado, migrado, konversaciaj kursoj, perbusaj kaj perpiedaj ekskursoj, amuzigaj vesperoj, kantado, folkloraj dancoj, ktp.

A.- Interesatoj sin direktu al Hungara Esperanto-Asocio, Pf. 2, H-7601 Pécs, Hungario, petante la programon de la 23-a Internacia Renkontiĝo Naturamika. Mi ripetas la adreson kun literumo.

Cl.- Jozefo kaj Csaba NEMES en Budapeŝto (Hungario) konstatis plibonigon de la aŭskultebloj. Ni citas ilin:

A.- "Kun plezuro ni kvitancas, ke la cirkonstancoj de la aŭskultado de SRI-programoj estas pli bona, ol en la pasintaj jaroj."

Cl.- Kaj pri la nova epoko en Orienteuropo ili diras:

A.- "Nun nova epoko komenciĝas en la landoj de Orienteuropo. Ne nur la registaro, sed la homoj opinias tiel, ke oni sukcesos, kaj necesos lerni fremdajn lingvojn, por ili povu iĝi eŭropanoj. Do espereble ne nur la anglan, germanan, francan, hispanan, italan sed ankaŭ la esperantan. Espereble ĉiujare la nombro de fidelaj geamikoj plue kreskos."

Cl.- NICA ESPERANTO-GRUPO (Francio) invitas al Internacia Esperanto-Semajno okazonta de la 29-a de junio ĝis la 6-a de julio. Alloga programo kun aŭtobusaj kaj ŝipaj ekskursoj al vizitindaj lokoj.

A.- Interesatoj petu informilon al Nica Esperanto-Grupo, Les Hortensias 2, 121 bis Boulevard Napoléon III, F-06200 Nice (Francio). Mi ripetas kun literumo.

Cl.- Heinrich NISCHWITZ en Bensheim (Germanio okcidenta) skribas:

A.- "Ankoraŭ mia plurjara kutimiĝo al la pasintaj sendohoroj ne plene konvertiĝis al la novaj, sed mi plu klopodas."

Cl.- Claude NOURMONT en Dalheim (Luksemburgio) anoncas, ke la 82-a Franca Kongreso de Esperanto okazos en Blois dum pentekosto de la 1-a ĝis la 5-a de junio. Koncerne al tiu grava aranĝo ŝi atentigas nin pri tri punktoj:

A.- Unue ne nur okazos vizito de la belega kastelo en Blois, sed la kongreso disvolviĝos en ĝi; due disvolviĝos riĉa kultura programo; trie la nefrancoj ne pagos la aliĝkotizon.

Cl.- Grandan sukceson ni deziras al tiu kongreso. Ni salutas Henri NUSBAUM en Valentigney (Francio), Jerzy OGINSKI en Szczecin (Pollando), kaj Mario ORTEGON en Bogota (Kolombio), kiu skribis:

A.- "Mi estas akurata aŭskultanto de viaj esperantaj programoj merkrede kaj sabate kaj mi povas diri ke via elsendo estas tre bonkvalita; pro tio mi ŝatus ke la programo estu iomete pli longdaŭra."

Cl.- Nino PALA en Caguari (Sardio-Italio) skribis:

A.- "Sabaton, la 23-an de decembro, je la horo 18.20, mi aŭdis (ĝis la fino de via programo) vian dissendon en la lingvo internacia. Des pli plezure ĉar tio okazis por mi tute hazarde dum mi traserĉis dissendon pri la gravaj okazaĵoj en Rumanio... Jen stimulo, por ke mi reakiru la bonan kutimon vin aŭskulti regule. Mi emeritiĝis antaŭ du jaroj. Ĝis tiam mi instruis (dum ĉirkaŭ 10 jaroj) ĝuste esperanton ĉe ŝtata elementa lernejo en Cagliari (Sardio).

Cl.- Amikecon al Ludoviko PALLOGI en Kecskemét (Hungario), al Leopold PATEK en Klosterneuburg (Aŭstrio) kaj al Stojan PAVUNĈEV en Vraca (Bulgario), kiu raportas pri seminario okazinta en lia urbo pri la temo "La internaciismo en la esperanto-literaturo";

A.- "En ĝi partoprenis pli ol 80 bulgaraj esperantistoj kaj samideanoj el Sovetunio, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Maroko kaj Salvadoro. Prelegis Julian MODEST, István ERTL kaj Nikola ALEKSIEV, vekante grandan intereson. Ĉiuj partoprenantoj al la seminario ricevis prospekton de Svisa Radio Internacia."

Cl.- Kaj Stojan PACUNĈEV opinias, ke tiu agado vikle plimultigos nian aŭskultantaron en Bulgario. José Luis PÉREZ OVILO en Murcia (Hispanio) raportas pri sia poresperanta agado.

A.- "La sendo de akra letero al la nacia radio kaŭzis 55-minutan elsendon dediĉitan al Esperanto. Mi devis fari dosieron por la konsilisto pri kulturo, kaj mi atentigis la radioelsendejojn kun esperanto-fako pri la turismaj allogaĵoj de Murcia fondita de Kalifo Abderraman en la jaro 825-a post Jesu-Kristo kaj mi proponas vizit-itineriojn".

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond daŭrigos la salutadon al la geaŭdantoj la venontan semajnon. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), novembro 2012*